Universala Esperanto-Asocio (en oficialaj rilatoj kun UN kaj Unesko)

La 2-a Virtuala Kongreso de Esperanto • 17 – 24 julio

# La Kolombo de Paco

**20-a de julio 2021, numero 10**

Redaktas Dmitrij Ŝevĉenko kaj Anna Striganova

## Kio estas Interkultura Kompetento? Ĉu ni bezonas ĝin?

Merkredon je la 13h00 okazos podia debato inter spertuloj pri tiu temo, kiu fariĝas ĉiam pli atentata en nia hodiaŭa mondo. Ĉu esperantistoj jam ĝuas specialan privilegion pri komunikado, aŭ ĉu ili ne konscias pri ĉiuj aspektoj de sia komunikado kaj nekomunikado? La diskuton pri la temo gvidos prezidanto de UEA Duncan Charters, kaj inter atendataj podianoj estas Mirejo Grosjean, Katalin Kováts, Ahmad Mamdoohi, Vicente Manzano-Arrondo kaj Radojica Petrović. Kontribuos ankaŭ multjara fakulo pri la temo kaj aŭtoro de *Ankaŭ vi estas fremdulo* Przemysław Grzybowski. Sekve de mallongaj kontribuoj kun specifaj aliroj al la temo, la podianoj diskutos inter si kaj poste malfermos la debaton al la publiko por demandoj kaj reagoj.

## AMO 74. La Programo

### La 22-an de julio (ĵaŭde) kadre de la 2-a VK okazos AMO 74

**Temo:** Kiel altiri pli da junaj membroj tra Eŭropo

Horoj lau CEST, do por UTC ekde 12:00.

**14:00:** Enkonduko Stefan MacGill: la prezentaĵo jam sendita kun EKO?

**15:00:** Prezento Duncan Charters.

**15:45:** Malferma diskuto kaj forumo pri la temo.

**16:30:** Raporto pri la klopodoj de la Eŭropa Komisiono pretigi liston de kursoj por la multaj lingvoj de la kontinento. Sekvos diskuto, kiel ni povos proponi eniron al la eŭropa komunumo por sukcesaj kursfinintoj, kiuj estos plejparte pli junaj. La modelo estis la ege sukcesa hispanlingva kurso en kelkaj latinamerikaj landoj.

**16:55:** Fermo

Aktivula Maturigo - Virtuala

## Senegalo cele al la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto

La 22-an de julio, ĵaŭde, inter 12:00 kaj 12:55 horoj (UTC), kadre de la 2-a VK, partoprenu prezenton de la 8-a Afrika Kongreso de Esperanto, kiu okazos de la 26-a ĝis la 30-a de decembro 2022 en Tieso, Senegalo.



Nun estas konstruata retejo kun la informoj pri la kongreso. Venu kaj eksciu detalojn: kiel partopreni, kontribui, subvencii. Jen estas rekta ligilo al la evento (por la aliĝintoj de VK): https://mallonge.net/fw_



# Aliĝilo kaj temo de la 107-a UK (Montrealo)

Malfermiĝis la aliĝilo de la 107-a Universala Kongreso de Esperanto (UK), kiu okazos en Montrealo, de la 6-a ĝis la 13-a de aŭgusto 2022. Frue aliĝu por ĝui la plej bonajn aliĝkotizojn: uea.org/kongresoj.



La kongresa temo estas: "Lingvo, vivo, tero: Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj". La temon proponis la Loka Kongresa Komitato (LKK) de Montrealo kunlabore kun la eks-prezidanto de UEA Mark Fettes kaj la Estraro de UEA. La Jardeko de Indiĝenaj Lingvoj estis deklarita de UN kaj Unesko fine de la Internacia Jaro de Indiĝenaj Lingvoj, kiu ludis gravan rolon en la agado de UEA kaj en la pritrakto de la kongresa temo de la 104-a UK, "Vivanta naturo, floranta kulturo" en 2019. Nun la 107-a UK estos unu el la internaciaj aranĝoj, kiuj helpos lanĉi la Jardekon por la periodo 2022-2032.



La atento al indiĝenaj lingvoj nekontesteble praviĝas, ĉar ili entenas grandan parton de la lingva kaj kultura diverseco de la homaro kaj estas la portantoj de valoroj kaj praktikaj konoj, kiuj montras kiel homaj socioj povas kunvivi harmonie kun la naturo. Kaj malpli pozitive: ĉar ili grandparte estas minacataj! de malape ro. Pri tio la LKK preparis specialan gazetaran komunikon en la angla kaj en la franca por diskonigi en Kanado, i.a. okaze de la 26-a de julio.

Esperantistoj jam delonge montris sin konsciaj kaj engaĝitaj pri lingvaj rajtoj kaj scivolemaj pri la apartaĵoj de malpli konataj lingvoj – do la du unuaj vortoj de la temo invitas nin al konatiĝo kun la fascina panoramo de indiĝenaj lingvoj kaj kun la streboj por ilin vivteni kaj revigligi. La tria vorto, "tero", atentigas nin pri la bataloj de indiĝenaj popoloj por la rajto mastrumi siajn proprajn teritoriojn, sed ankaŭ memorigas, ke tia indiĝena mastrumado estas efika strategio por konservi arbarojn kaj aliajn ekosistemojn. Tiamaniere la temo ankaŭ ligiĝas al la diversaj engaĝiĝoj de UEA kaj la Esperanto-movado, subtene al la 17 Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE) de Unuiĝintaj Nacioj. La graveco de lingva diverseco por la realigo de la Celoj certe troviĝos inter la ĉefaj diskuttemoj en Montrealo.



La prezidanto de UEA, Duncan Charters, komentis pri la temo: "La tero estas la kunteksto de la kiel eble plej diversa koncepto de vivo. La sankteco de niaj rilatoj kun la komune posedata kaj posedanta tero estas aparte rimarkebla en indiĝenaj kulturoj. Kaj la lingvoj estas la plej alta kaj plej diversa esprimiĝo, kiu en diverseco povas ĉiujn unuigi".

Ne maltrafu dum la 2-a Virtuala Kongreso, okazanta, partopreni la montrealajn programerojn (vk.retevent.com/programo?s=Montrealo) kaj la babilrondon pri indiĝenaj lingvoj kun Mark Fettes (vk.retevent.com/programo?s=Kanado). Aliĝi al la VK eblas per vk.esperanto.net.

Vi povas esti aŭtoro de la *Kolombo de Paco* kaj la Reta Revuo! Por kontribui, skribu al la redakcio *redakcio@revuoesperanto.org*

# Esperanto kaj Interkultura Komunikado




Dum tri tagoj, inter la 9-a kaj 11-a de julio 2021 en la Universitato de Ŝirazo, Irano, okazis Internacia Ret-seminario kun la titolo "Esperanto kaj Interkultura Komunikado".


En la jutuba kanalo de UEA *UEAViva* troviĝas kompletaj registraĵoj de la 3-taga evento kun 6 ĉefaj prelegoj kaj 7 enkondukaj prelegetoj.

Dum la seminario okazis prelegoj de profesoroj-esperantistoj en Esperanto kun realtempa interpretado en la persan.

La 9-a de julio, vendredo:
https://youtu.be/pE3W4jPxF_I
La 10-a de julio, sabato:
https://youtu.be/SYOnXUB6JIY
La 11-an de julio, dimanĉo:
https://youtu.be/-c_MqlTxsAs

# Kosmo Strategio 10-jariĝis!

Kosmo Strategio 10-jariĝis! Pli ol 120 monatoj da projektoj, agadoj kaj konkretaj rezultoj en nia movado! La virtuala (naskiĝtaga?) festo okazis kadre de Kleriga Lundo, kaj intervenis pluraj homoj kiuj rakontis pri siaj spertoj kaj aktivaĵoj. La kunveno komenciĝis per mallonga rakonto pri kiel Kosmo naskiĝis kaj kiel ĝi komencis subteni Esperanton en Italio. Partneraj projektoj estis prezentitaj, kun aparta atento al kapabligo, aktivula trejnado kaj instruista trejnado. Aparte grava estis la kontribuo pri la Afrik-Eŭropa Junulara Kapabligo, kiu permesis la unuan IJK-n en Afriko.




Spertojn pri la efiko de eŭropaj projektoj ĉe loka, nacia kaj internacia niveloj kunhavigis homoj el Italio, Francio, Danio, Hispanio, Britio, Pollando, Germanio, Burundo kaj Kongolando.

(Re)spektu ĝin dum VK ĉe https://mallonge.net/ft



# Finaj rezultoj de Virtualaj Kvizoj

Marde vespere finiĝis la kvara kaj la lasta parto de Virtualaj Kvizoj. La unuan premion gajnis la plej sperta kvizemulo – Valentin Melnikov, kiu dum tri tagoj solvis 29 kvizojn, do entute 290 enigmojn (29 kvizoj x 10 enigmojn). Ne ĉiuj kvizoj estis facilaj...




Sur la dua loko estis Monika Molnar kun 16 kvizoj (160 enigmoj). Po ses kvizoj (t.e. sesdek enigmoj) solvis Laszlo Szilvaszi, Miguel Bento kaj Tatiana Terekhova.

| | kvizemuloj | Parto 1 | Parto 2 | Parto 3 | Entute |
|---|---|---|---|---|---|
| 1 | Valentin Melnikov | 7 | 11 | 11 | 29 |
| 2 | Monika Molnar | | 9 | 7 | 16 |
| 3-5 | Laszlo Szilvaszi | 6 | | | 6 |
| 3-5 | Miguel Bento | 6 | | | 6 |
| 3-5 | Tatiana Terekhova | 5 | | 1 | 6 |
| 6 | Armelle Esperanto | 5 | | | 5 |
| 7-8 | Santiago Vallejo | 1 | | 2 | 3 |
| 7-8 | Miha Adri | | 1 | 2 | 3 |
| 9 | Amri Wandel | | 1 | 1 | 2 |

**Gratulon por ĉiuj!**

Entute partoprenis ĉ. kvindek gekongresanoj, sed iuj nur observis la ludon...

Se iu volus scii kiel aspektas Virtualaj Kvizoj – oni povus trejni laŭ provaj kvizoj.

Simple iru al ili laŭ la ligilo:
https://learningapps.org/view7329573


https://www.facebook.com/esperantorevuo

**Sekvu la revuon *Esperanto* kaj la Retan Revuon**

https://twitter.com/revuo_esperanto

# Legantoj de la revuo *Esperanto*

Dankon al ĉiuj legantoj de la revuo *Esperanto*! Ni respondis al ĉiuj demandoj, kiuj estis dum la VK-programeroj. Ne hezitu sendi viajn demandojn, proponojn ka. al la retadreso de la revuo: *redakcio@revuoesperanto.org*




Ĉu vi jam legis la duan numeron de la jaro 2021 de la *Unesko-Kuriero* en Esperanto? Ajnokaze vin povas elŝuti ĝin senpage: https://uea.org/revuoj

